# *Miguel Díaz-Canel finis sian turniron tra europaj kaj aziaj landoj .*



Pekino, 12 nov (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel faris teknikan halton en ?inio post fini en Laoso sian unuan internacian turniron kiel insula ?tatestro.

La akcepto en Laoso estis tre intensa kaj afabla, kie li havis oficialan laborprogramon kiu inkluzivis dialogon kun la prezidento kaj ?efministro de tiu azia lando.

Dum la vizito ili subskribis du gravajn interkonsentojn pri sporta kunlaboro kaj pri banka kunlaboro inter la du landoj.

Kvankam la diplomatiaj rilatoj inter Kubo kaj Laoso ekzistas de la jaro 1974, Díaz-Canel estas la unua insula ?tatestro kiu vizitas tiun landon el sudorienta azio.

En la komenco de sia turniro, la kuba prezidento faris teknikan halton en Francio, kie li estis akceptita de la ?eministro Édouard Philipe.

Poste li vizitis Rusion, la popolan respublikon demokratian de Koreio, ?inion, Vjetnamion kaj Laoson.

Díaz-Canel estarigis sian turniron, dum kiu li kunsidis kun Vladimir Putin kaj Xi Jinping, kiel plia pruvo pri la subteno de la mondo al Kubo kaj la rifuzo kontra? la sie?o altrudata al la insulo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/176302-miguel-diaz-canel-finis-sian-turniron-tra-europaj-kaj-aziaj-landoj

**Radio Habana Cuba**